

GVIDILO

por

KURSGVIDANTOJ



Stefan MacGill

Enhava kontrolo: Membroj kaj aktivuloj de ILEI
Lingva kontrolo: Rob Moerbeek, Nederlando

**Servo al la movado liverita de
Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**



Budapeŝto, la 11an de julio, 2013

GVIDILO por KURSGVIDANTOJ

Celo de la Gvidilo

Helpiloj en la Gvidilo

Enhavo de la Gvidilo

1. Kursoj estu plejparte cellingvaj.
2. Kursoj kiom eble aktivigu lernantojn.
3. Uzu variajn teknikojn kaj grupigojn.
4. Ekkonu la kapablojn kaj atendojn de viaj kursanoj.
5. Kursoj ne nepre estu gramatike bazitaj.
6. Kursoj estu verbocentraj.
7. Ekspluatu realajn kaj konatajn kuntekstojn.
8. Prezentu ekzemplojn kun komunika utilo.
9. Aŭdigu variajn, bonkvalitajn parolojn.
10. Kursoj informu pri kulturaj konoj kaj praktikaj uzebloj.
11. Okazigu regulajn testojn kaj konigu ekzameneblojn.
12. Fortigu viajn proprajn pedagogiajn kapablojn.

Celo de la Gvidilo

Prospera estonto de nia lingvo troveblas nur se ni kapablas efike kaj celtrafe konsciigi multe pli da homoj pri ĝiaj utilo kaj valoro. Farinte tion, nia dua tasko estas moderne kaj instige instrui la lingvon. Por tio ni feliĉe havas kadron da profesiaj instruistoj, inter ili instruistoj de lingvoj. Sed ofte okazas, ke aliprofesiaj esperantistoj – eble eĉ sen pedagogia trejnado – deziras aŭ havas eblon gvidi kursojn aŭ eĉ kontraŭdeziro trovas sin en situacio en kiu ili devas tamen prizorgi kursgvidadon. La nuna gvidilo celas helpi al tiaj personoj.

Helpiloj en la Gvidilo

Nia gvidilo plurloke referencas al la libro *Manlibro pri la Instruado de Esperanto* (E@I, ILEI, 2005, 2009), kiu prezentas la temaron pli detale. Tiuj referencoj estas markitaj per la siglo MANL. Nia gvidilo proponas nur kelkajn komencajn paŝojn, kaj en la lasta sekcio proponas fontojn por pliaj helpiloj kaj plia studado.

Enhavo de la gvidilo

1. Kursoj estu plejparte cellingvaj.

1.1 Ni iru la vojon celitan

Jen principo jam de kvardek jaroj vaste akceptita en lingvo-instruaj rondoj; kiujn ni devus pli vaste respekti kaj apliki. Ni ne rajtas atendi, ke ĉiu kursgvidanto havu la personecon kaj talenton kaj emon instrui laŭ puraj Ĉe-modelaj principoj. Tamen, niaj kursoj kiel eble plej frue portu lernantojn for de la misinfluo de ilia denaska lingvo, por ke ili mem eksentu la *spiriton* de Esperanto, kaj vere ekpensu en la nova lingvo. Daŭra referencado al la denaska lingvo per tradukemaj metodoj kaj teknikoj malhelpas kaj malfruigas tiun necesan transiron. Perverse, esperantistoj restas eksdataj kaj

plejparte restas ĉe instruaj tradicioj de la pratempo, obstine produktantaj dulingvajn lernilojn, kaj dum la leciono klarigante nacilingve *pri* la lingvo, anstataŭ vere priekzercigante ĝin.

1.2 Uzu la lingvon praktike

Ĉiam, kiam eble, donu viajn instrukciojn kaj klarigojn en Esperanto, kun aŭ sen traduko nacilingven. Ne perdu la eblon aŭdigi la lingvon en reala kunteksto. (vidu 7 kaj 9). Laŭeble uzu lingvajn elementojn, kiujn vi jam prezentis, sed foje eblas preterpaŝi tiun limigon, ĉar ofte la kunteksto komprenigas la signifon.

2. Kursoj kiom eble aktivigu lernantojn.

2.1 Lernu per elprovoj

Oni lernas farante. Teorio kaj klarigoj havas rolon, sed saĝe elektitaj ekzemploj povas same efiki. Lernemo estos spronita, se kursanoj jam frue kaj regule havos eblon mem elprovi la novan lingvon – ĉu parole, ĉu skribe. Por ke tio sukcese okazu, vi bezonas klaran didaktikan ŝtuparon (vidu 5.1 kaj MANL sekcio 2.3) tiel ke vi prezentu materialon en vicordo, kiun la lernantoj povu optimume sorbi kaj aktivigi. Igu la lernantojn ne nur interagi kun vi, kiel gvidanto, sed ankaŭ unu kun la alia (vidu 3.1) Se via kurso povos enhavi lernantojn el diversaj lingvo-fonoj, tiu interago estos des pli valora. Ĉiam strebu al tia internacieco.


2.2 Ĥorusa respondado

Uzu ĥorusan respondadon ŝpareme, se vi insitas uzi ĝin entute. Komencita ĥorusa respondado povas kreskigi kuraĝon ekparoli, sed tuj post la prezento kaj ĥorusa eldiro de nova frazo, igu la lernantojn reprodukti ĝin ankaŭ unuope. Individua parolado estas la komencpunkto por vera komunikkapablo.

3. Uzu variajn teknikojn kaj grupigojn.

3.1 Grupoj aŭ la pleno?

Teno de entuziasmo kaj lernemo dependas de variaj lecionoj. Konigu la planatan strukturon de via leciono. Ĝi rajtas enhavi instruisto-centrajn partojn, sed zorgu ke estu partoj kiam unuopaj kursanoj povos aktivi, ĉu rilatantaj kun vi, ĉu kun aliaj kursanoj. Planu grupajn kaj parajn aŭ triopajn laborojn. Se vi havas 16 kursanojn, instruisto-centra aliro, sen la uzo de ĥorusa respondado, signifas ke maksimume 1 lernanto el 16 aktivos en difinita momento. Kun kvar grupoj, aktivos 4 el 16, kun triopa tasko, aktivos proksimume 5, kun para laboro, aktivos 8.



Danĝero kun para aŭ etgrupa laboro estas, ke vi ne nepre havos eblon kontroli la lingvan produktadon, kaj eble tralazos erarojn. Tamen la gvidanto kiom eble rondiru por rimarki kaj korekti erarajn uzojn – ĉu tuje, ĉu poste, kaj por bremsi krokodiladon. Zorgu ne doni taskojn preter la kapabloj de la lernantoj – tio nur spronos krokodiladon.

Kiam vi faras grupan laboron, laŭeble loku grupgvidanton en ĉiu grupo; iu kun pli evoluinta lingva kapablo, aŭ nur kun kuraĝo (pravigita aŭ ne) paroli ĉellingve. Se vi havas la eblon, antaŭ la leciono klarigu al ili la taskon kaj ilian rolon instigi la grupon bone funkcii. (MANL, sekcio 6.1)

3.2 Vario de korektemo

Okazos momentoj kiam vi prezentos novan gramatikaĵon – ĉu per reguloj, ĉu per ekzemploj. Poste, vi invitos viajn kursanojn reprodukti la lernaĵon. En tiuj momentoj (kaj en aliaj), ĉefe gravas la korekteco. Gvidanto, do, intervenu por korekti erarojn kaj doni pliajn klarigojn aŭ doni pli da bonaj ekzemploj. Okazos aliaj momentoj, kiam vi invitas lernantojn montri sian regon de diversaj instruitaj elementoj kaj per ili plenumi iun komunikan taskon. Kiam temas pri parola tasko (dialogado, rolludado...) estu malpli ema ensalti por korekti erarojn. Komprenu, ke parolo en grupo aŭ publiko en lernata lingvo estas timiga situacio – vi ne altigu la tim-nivelon. Provu noti mem erarojn, kaj poste traktu ilin. Intervenue nur se vi aŭdas tian eraron, kiun la aliaj riskus ripeti.

3.3 Prezento kaj firmigo

Prezenti novan gramatikaĵon estas relative eta parto de via tasko kiel instruisto. Zorgu nur, ke via klarigo ne estu tia, ke ĝi semu la riskon de miskompreno kaj misuzo poste. Se okazos miskompreno, agu decide por korekti tion. Ajna instruisto diros al vi, ke la malfacila parto de la instruprocezo estas ekzercigadi la instruadojn, por ke ili estu sisteme uzataj kun korekteco en ĉiam pli variaj cirkonstancoj kaj kunteksto. La principon de la aktuzativo vi klarigos en dek minutoj, sed ni ĉiuj povas citi kazojn, kie la kapablo ĝin ĝuste uzi fariĝas tutviva lukto.

3.4 Specoj de lecionelementoj

Elementoj uzablaj por la firmigo de instruadoj estas multaj. Vi kiel gvidanto konu ilin – se necese ekscii kiel oni nuntempe instruas aliajn (multe pli komplikajn) naciajn lingvojn. Eĉ se ili devas prezenti ege pli komplikajn lingvo-strukturojn, ili havas amason da bonaj, aprezataj aktivaĵoj, kiuj restas obstine apenaŭ konataj en niaj instruistaj rondoj. Pensu pri priskribado de bildoj, komentario de vid- aŭ son-bendoj, dialogado, rol-ludoj, pretigo kaj prezento de skeĉoj, kantado, grupaj projektoj, diskutado kune kun raportado pri tiuj diskutoj, vortaj, frazaj aŭ alispecaj aŭkcioj, ludoj, kvizoj, kma.

4. Ekkonu la kapablojn kaj atendojn de viaj kursanoj.

4.1 Antaŭaj lingvaj konoj

Iuj kursanoj verŝajne havas grandajn lingvajn kapablojn. Ili eble jam regas unu aŭ plian eŭropan lingvon kun simileco al Esperanto. Tiukaze evito de interfero donas defion samnivelan al la lernoprocezo mem. Eksploatu tiun lingvo-bazan pluson, sed konsciu pri la paralelaj minusoj. Manke de kono de parenca lingvo, viaj kursoj devos klarigi pli zorge kaj detale multajn lernaĵojn – iujn universalajn, aliajn specifajn al la misinfluo de la denaska aŭ lernata lingvo. Ne lasu la mankon de parenca lingvo deturni vin de la bezono aktivigi frue kaj ofte la celatan lingvon – en tiuj kazoj ĝi estas des pli bezonata.

4.2 Gradoj de gramatika matureco

Iuj havos firmajn gramatikajn konojn – tamen tiaj homoj fariĝas ĉiam malpli multaj. Se jes, ili aprezos kurson, kiu klarigos Esperanton laŭ gramatikaj manieroj. Se ne, vi devos klarigi gramatikajn konceptojn ĝenerale, antaŭ ol klarigi kiel ili funkcias en Esperanto. Aŭ vi decidus plejparte preteriri la gramatikon, kaj instrui nian lingvon ‘rekte’ (vidu 5).

4.3 Atendoj kaj celoj de lernantoj

Se la kurso estas deviga aŭ prepara al bezonata ekzameno, la atendo kaj celo povos esti ne pli ol sukceso en tiu ekzameno. Se la kurso estas memvola, vi kiel instruisto devas nepre konscii kial kursanoj eniris la kurson, kaj kion ili atendas ĉerpi el ĝi. Se ili ne havas klarajn imagojn, estas via tasko prezenti al ili la eblecojn – dum aŭ apud la kurso. (vidu 10).

4.4 Artismaj talentoj

Via grupo sendube enhavos homojn kun difinitaj talentoj kaj preferoj. Povos temi pri kantado kaj muziko, arto kaj desegnado, aktoremo kaj skeĉumado aŭ debatado. Se vi bonŝancas, la tuta grupo, aŭ pluraj el ĝiaj membroj, havos komunajn interesiĝojn. Vi miros kiom frue en la kurso vi povos ekuzi tiajn artkampojn por alporti ion instigan al la lecionoj.

4.5 Individuaj diferencoj

Iuj el viaj lernantoj estos babilemaj, kuraĝaj kaj eksperimentemaj. Aliaj estos silentemaj, timemaj kaj malemaj al publika aŭ grupa parolado kaj klare malkomfortaj kun rolludado kaj tiaj spontaneaj ekzercoj. Kuraĝigu la pli retiriĝemajn lernantojn tamen aktivi, unue en etaj grupoj, poste en la plena klaso. Foje necesas bremsi parolemulojn, por doni eblojn al la malpli trudemaj kursanoj.

Vi trovos en grupo malsamajn lernrapidojn. Eventuale via kursanaro havos diversaĝajn lernantojn. Vi devas elabori taktikojn trakti tiujn defiojn – ofte la uzo de grupa laboro helpas en tio. Tio levas la eternan dilemon – ĉu grupigi lernantojn laŭ kapablo por ke ĉiu progresu laŭ sia propra ritmo, aŭ preferu miksitajn grupojn, por ke pli fortaj helpu al mapli fortaj. Se via kurso estas internacia; nepre zorgu, ke la grupoj estu miksitaj laŭ devenlingvoj.

5. *Kursoj ne nepre estu gramatike bazitaj.*

5.1 Unika flekseblo ĉe la didaktika ŝtuparo

Starigante kurson, vi bezonos didaktikan ŝtuparon. Vi povos tion preni de iu ekzistanta kurslibro aŭ retkurso, aŭ vi povos uzi (aŭ adapti) tiun de la *Cseh*-metodo (poste ankaŭ ‘Ĉe-metodo’). Pro la ekstrema flekseblo de nia lingvo, gravas kompreni, ke vi ĝuas unikan flekseblon en la elekto (aŭ evoluigo) de via ŝtuparo. Esperanton oni povas ekinstrui ekde praktike ajna komenckpunkto kaj ĝui grandan elekton pri la ordigo de ĝiaj instrupaŝoj. Ne komencu instrui sen konscia decido pri la uzota ŝtuparo. Ŝtuparon vi povas enporti de ekzistanta fono. La plej konata ŝtuparo estas tiu de Ĉe, praktike ĉiu lernilo baziĝas sur propra ŝtuparo – la granda plimulto estas tamen forte influataj de la Ĉe-modelo.

5.2 Kio regu: gramatiko aŭ situacioj?

La celo de lingvolernado estas akiri komunikan kapablon en la nova lingvo, ĉu skriba, ĉu parola, kune kun kapablo aŭskulte aŭ lege kompreni la lingvon. La celo ne estas kompreni kaj regi ĝian gramatikon – tio devas aŭ povas esti rimedo por la akiro de uzebla komunika kapablo. Vi kiel kursgvidanto devas fari klaran decidon; ĉu via kurso estos unuavice gramatike bazita aŭ ĉu ĝi estos komunike kaj situacie bazita? Vian decidon influos la kapabloj kaj emoj de viaj lernantoj (vidu 4) kaj tiujn de vi mem. Se viaj lernantoj ne multe komprenas gramatikajn konceptojn, eble vi pli bone prezentu la lingvon per bone elektitaj ekzemploj. Ne nepras, ke viaj lernantoj bone komprenu gramatikon (de ajna lingvo), sed neeskapebla devigo por vi kiel kursgvidanto, estas ke vi havu komprenon de la Esperanta gramatiko, kaj mem laŭeble bone parolu la lingvon. Prefere vi konu Esperanton laŭ ĝiaj propraj trajtoj kaj unikaĵoj, kaj ne tra la prismo de via denaska aŭ alia lernita lingvo. Tre dezirinda solvo al la dilemo estas trovi iun ekvilibron inter la komunikado kaj la gramatiko. La sekreto de sukcesa lernil-pakaĵo aŭ kurso estas la lerta parigo de gramatiko kun situacioj. En bonŝanca kazo, vi trovos kaj uzos lernilaron, kiu jam entenas bonan parigon de situacioj kun gramatikaĵoj.

5.3 Viaj propraj kapabloj

Se via lingva kapablo ne brilas (laŭ la dubinda principo: ...instruisto progresu je unu leciono pli ol la lernantoj... hmmm.) vi urĝe entreprenu paŝojn bonigi ĝin. Vi en la lern-situacio donas la modelon, kaj via modelo devas esti senriproĉa aŭ almenaŭ tre sekvinda. (vidu [12](#)).

5.4 Klarigu gramatikon en Esperanto

Se via kurso estas parte aŭ tute gramatike bazita – faru la penon kiel eble plej frue prezenti tion en Esperanto mem! Tio, signifas, ke bazajn vortojn vi devos instrui frue en la kurso: vorto, litero, verbo, frazo, substantivo (o-vorto), adjektivo (a-vorto) ktp. Vi miros kiomo estas klarigebla per eĉ tre simplaj frazoj: kiel konkreta ekzemplo, vidu kiel faras tion la kurso e125. Instruu frue la imperativon, por ke vi povu fari realajn petojn en Esperanto. La gramatikaj klarigoj en Esperanto des pli valoras, ĉar ili uzas la lingvon por aŭtentika komunikado, kaj ĉe lernantoj kun alilingvaj gramatikaj konoj, la kunteksto estos jam divenebla. Valora frazo por frua lernado: ‘Kiu estas la vorto en Esperanto por ‘xxxxx’?’

6. Kursoj estu verbocentraj.

6.1 Facila lingvo !?

Facilas kredi la asertojn de niaj propagandiloj: ‘Esperanto estas facila lingvo’. Evidente, tio havas ian pravecon. Pli ĝuste tamen diri (kiel niaj pli saĝaj varbiloj) ke nia lingvo estas relative simpla. Kun piednoto ke ĝia facileco ege dependas de via denaska lingvo kaj kultura fono. Instruisto de Esperanto devas starigi al si la demandon: ĉu tamen nia kara lingvo ja havas malfacilajn partojn? Espereble oni (aŭdinte ĝian tre varinivelan praktikadon kaj varilandajn dialektojn) venas al la ideo, ke ĝi ja havas malfacilajn partojn, kiujn necesas analizi kaj ekkoni. Kelkaj rilatos al misinfluo de la devena lingvo de la lernantoj – enlanda instruisto devas evoluigi taktikojn por superi tiujn devenlingvaj misuzojn – sed aliaj eroj de Esperanto prezentas defiojn al plimulto de la lernantoj, sendepende de la devena lando, lingvo-regiono aŭ kontinento. Instruistoj kaj lernilo-verkistoj havas devigon malkovri tiujn tiklajn punktojn kaj krei kursojn por ilin trakti prioritare.

6.2 La esenco de verboj

Verboj gravas en ajna lingvo. La frazo estas la minimumo de komunikado kaj la verbo estas la motoro de la frazo. Sed en Esperanto eĉ pli gravas la rolo de la verbo. Eble vi protestas, ke verboj en Esperanto estas unike facilaj – en naciaj lingvoj ili estas tipe la plej malregulaj kaj neregeblaj partoj. Ĉe ni: –as, -is, -os, -us, -u ... kio povos esti pli facila? La malfacilo pri verboj en Esperanto estas la devigo scii ilian transitivecan staton. Kursoj emfazu verbojn – ilin ĉiam prezentu kaj priekzercigu en iliaj minimumaj kunteksto. Substantivojn kursanoj povas laŭliste enkapigi senriske por hejmtaskoj; verbojn oni nepre traktu en la kurso, kun kontrolo de la ĝusta uzo. Korekta instinkta kapablo enkategoriigi la verbojn estas antaŭkondiĉo por korekta uzo de la akuzativo kaj la ŝlosilaj sufiksoj –ig- kaj –iĝ-. (Por pli da detaloj, vidu sub [12](#) kaj MANL sekcio 12.1.1.)

7. Ekspluatu realajn kaj konatajn kuntekstojn.

7.1 Kunteksto por klarigi

Efika maniero igi lernantojn kompreni prezentatan materialon estas la uzo de praktikaj kunteksto. La signifo de frazoj estas ofte kaptebla, simple pro la kunteksto en kiu ili aperas. Tio permesas al kursgvidanto eviti la bezonon uzi tradukojn por klarigi novan materialon. Tradukado kuraĝigas la kursanojn persiste pensadi en sia devenlingvo kaj malfaciligas al ili senti la spiriton de la nova lingvo. Piktogramoj fariĝis universalaj komunikiloj, uzu ilin por prezenti verbojn: Ne parku ĉi tie. Dekstra turno malpermesata. Rapidlimo: 50 km/h, vi venas al vojkruciĝo. Cifereca horloĝo uzeblas por klarigi: sekundo, minuto, horo... kaj kalendaro por tago, semajno, monato, sezono kaj jaro.

7.2 Petoj havas sian kuntekston

En la kurseja vivo amaso da praktikaj aferoj estas farendaj. Petantaj tiujn nacilingve oni forĵetas grandiozan manieron senkoste firmigi la komprenon de amaso da lernaĵoj: Bonvolu... viŝi la tabulon, fermi la fenestron, veni al la tabulo, montri vian bildon, ktp. La kunteksto jam klarigas la signifon. Vi instruas pli ol vi unuavide imagas: 'Bonvolu fermi la pordon' firmigas ne nur la vorton 'pordo', sed ankaŭ la verbon 'fermi', plie la fakton ke 'fermi' estas transitiva verbo kaj krome vi donas rimedon starigi afablan peton. Eĉ se via peto bezonas pli da gramatiko ol vi instruis, ne timu fari ĝin en Esperanto – vi povas aldoni klarigon aŭ tradukon se necese. Esperanto rolu ne nur en la formale 'leciona' parto de la kurshoro, sed ankaŭ en la organizaj momentoj. Lernantoj sentu, ke per transpaso de la lernloka sojlo, ili eniris Esperantan etoson.

7.3 Aliaj rimedoj komprenigi novaĵojn

Bildoj, gestoj, filmoj kaj sonbendoj estas aliaj manieroj komprenigi nekonatajn vortojn sen tradukado – oni imitu *Cseh*-instruadon, sen la nepra devigo porti al la kurso eksplodantan valizon superplenan je ludiloj kaj objektoj. Evitu la danĝeron instrui ĉefe substantivojn, ĉar por ili facilas arigi bildamason. Ĉefe verboj bezonas bonan prezentadon. Por tio bildoj foje utilas, sed kiam eble – precipe por junaj lernantoj – elektu tre fizikajn verbojn kaj ne nur la instruisto gimnastiku: lernantoj pli bone enkapigos la signifon de verbo se tiu devas reagi al ĝi fizike: 'Tuŝu vian nazon, Montru vian taglibron, Levu la valizon, Fermu la pordon...'

8. *Prezentu ekzemplojn kun komunika utilo.*

La celo de lingvo estas komuniki. Do, prezentu modelajn frazojn, kiuj estas vere uzeblaj. Via tasko estas krei aŭ simuli situaciojn en kiuj studentoj povu sencohave ekzerci sin pri la lernitaj frazoj, kun ekzemploj, kiuj povos esti reale utilaj, unuavice inter parolprovemaj kursanoj ekster la kurso, kaj poste (espereble) kiam ili troviĝos en aŭtentika situacio en la Esperanto-komunumo.

Evitu la emon pretigi lecionan materialon kiu priskribas la mondon (floro estas planto, tablo estas meblo, kato estas besto...) ĉar tiuj frazoj ne portas praktikan komunikan kapablon – plie ili estas uzeblaj kun tre limigita kvanto da verboj (vidu [6](#)).

9. *Aŭdigu variajn, bonkvalitajn parolojn.*

Andreo Ĉe postulis la sinsekvon 'aŭdigu', 'paroligu', 'legigu', 'skribu'. Lia metodo forte emfazas la kapablon paroli kaj aŭskulti. Tio efektive estas saĝa vicordigo, ĉar plimulto de la kursanoj lernas la lingvon por akiri parolkapablon kaj (pli grave) interparol-kapablon. Por paroli kun ĝusta prononco, ja necesas unue aŭskulti la lernotajn frazojn. Por povi korekte skribi, oni ja devas unue legi la skribendajn frazojn. Lingvaĵoj devas unue alveni al lernanto, antaŭ ol povi atendi produktivan lingvouzon.

La Ĉe-metodo tamen dozis zorge la materialojn. Oni aŭdis nur la modelajn frazojn, kiujn oni (tuj) poste devis produkti. Lernanto aŭskultis, kaj tuj poste devis paroli. Tiel, temis fakte pri ripetado aŭ imito de la aŭdita frazo. Ofte, tiu dirado estis farita eĉ ĥore. Temis do pri papagado, tamen kun la celo, ke tio poste fariĝu pli aŭtomata kaj pli kreiva. Komence de kurso, ne eviteblas doni modelon kaj atendi reproduktadon. Sed la kurso kuraĝigu kiel eble plej frue pli liberan kaj kreivan uzon de la diversaj aŭditaj modeloj.

Vera parolkapablo ja postulas ne nur kapablon diri parkerigitajn frazojn, sed sintezi parolaĵojn el diversaj lernaĵoj. Ironie, bona maniero sproni la parolkapablon estas abunde aŭskultigi bonkvalitan kaj varian materialon preter la nivelo postulata por aktiva uzo. Permesu al lernantoj konatiĝi kun 'la muziko de la lingvo'. Tamen, provu elekti specimenojn, kiuj ne estas nenecese komplikaj aŭ fakaj. Donu tuj antaŭ la aŭskultigo etan kuntekstan enkondukon (ekzemple instruu kelkajn nekonatajn vortojn) kaj emfazu klare, ke lernantoj ne timu se ili eble ne tuj komprenos ĉion en la aŭdotaĵo.

Refoja aŭskultado donos pli bonan rezulton. Tiu altnivela aŭskultigo ne anstataŭas la aŭdadon de aktive lernotaj materialoj; ĝi suplementu tiun.

Nuntempaj teknikaj rimedoj ege faciligas la prezenton de diversaj parol-specimenoj de diverslandanoj. Parto de lingvolernado estas la kapablo kompreni kaj trakti diversajn naciajn akĉentojn.

10. Kursoj informu pri kulturaj konoj kaj praktikaj uzebloj.

Se via kurso ne prezentas la kulturan kuntekston de la lingvo ... de kie la lernantoj ĉerpu tion? Ili riskas ne malkovri la vojon tien. La unua paŝo estas doni al ili praktikajn informojn pri la uzeblo de la lingvo: enlandaj renkontiĝoj, kluboj, retejoj, internaciaj renkontiĝoj (iel pli valoraj ol enlandaj), kongresoj, revuoj. Emfazu tiujn aranĝojn kaj servojn, kiuj konvenas al la aĝo kaj interesiĝoj de la kursanoj. Se vi aŭ ili ne interesiĝas multe pri la historio, literaturo aŭ organizaj strukturoj en la Esperanto-komunumo, tamen donu almenaŭ ligilojn al lokoj, kie alireblas tiaj informoj. Pripensu la eblon tamen aldoni al via kurso tekstojn aŭ sondokumentojn pri tiuj temoj. Zorge elektitaj fragmentoj el la Esperanta literaturo povas utili en la kurso mem. Aŭdi aŭ legi raportojn de homoj pri la partopreno en aranĝo povas pli valori ol nura prezento de faktoj. Interkulturaj prezentoj povas valori: kiel agas aŭ pensas homoj el diversaj mondpartoj kaj kulturoj – Esperanto estas vere taŭga perilo por tiaj temoj (MANL sekcioj 3.2.5 kaj 12.7). Kiam lernantoj ekuzos la lingvon por rilati kun homoj el tra malsamaj kulturaj fonoj, ne sufiĉas nur la lingvo-kono, nek eĉ ĝia ĝenerala filozofio (se ĝi tion havas), necesas plie la kapablo iomete kompreni la diferencojn inter kulturoj, kaj kiel kondukti konvene por respekti tiuj diferencojn.

11. Okazigu regulajn testojn kaj konigu ekzameneblojn.

Regula testado helpas al vi kompreni la efikecon de via instruado, ĝi permesas al vi pli rapide rimarki problemojn kaj interveni por solvi ilin, ĝi aldone helpas al studentoj pli efike direkti sian propran lernadon.

Pri ekzercotipoj legu en MANL sekcio 12.6; vi trovos tie ankaŭ ekzemplajn ekzercojn.

Vi trovos ĉe MANL en sekcio 9 multajn informojn pri la diversaj ekzamenaj proponoj, ŝtate agnoskitaj kaj ne. Ĉe www.ilei.info, sub Agado > Ekzamenoj vi trovos klarigon pri la diferenco inter la du ĉefaj internaciaj ofertoj.

12. Fortigu viajn proprajn pedagogiajn kapablojn.

//Kompletigota sekcio:

PIV: Plena Ilustrita Vortaro, SAT, 2006.

PAG: Plena Analiza Gramatiko. Kalocsay, Waringhien. (elĉ.)

Pomego: Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko (PMEG), Bertil Wennergren. Akirebla fizike kaj rete.

Detala Gramatiko de Esperanto, Bertil Wennergren, E@I, ILEI, 2010.

Retejoj:

www.edukado.net: ĉefe E-lingva paĝaro kun multaj elŝuteblaj instruhelpiloj, tekstoj, ekzercoj, ludoj. Ankaŭ katalogas konatajn E-kursojn tra la mondo, rigardebla pere de interaktiva mapo.

www.lernu.net: prezentas kelkajn Esperanto-kursojn kune kun apogaj materialoj, tra multlingva interfacio, kun elektronikaj vortaroj.

www.ilei.info: la interna E-lingva paĝaro de ILEI, kun informoj pri Konferencoj de ILEI, revuoj, referencaj dokumentoj (inter ili gvidiloj por plej diversaj oficoj aŭ taskoj), historiaj dokumentoj, listo de sekcioj, komitatanoj, laborgrupoj, partneroj k.m.a.

www.ilei-mondo.info: konstruata multlingva paĝaro kiu turnas sin al la ekstera mondo. Trovu tie i.a. la nunan staton de la cellingva kurso 'e125', kiu aplikas multajn el la principoj prezentitaj ĉi tie.

=====

La verko estas unuavice disponigita en elektronika formo; sekve ĝi fariĝos dinamika dokumento, kiu akceptos modifojn kaj kompletigojn.

=====

Ĉe //1UEA/Gvidiloj/. Komenca disponigo: 8an de julio, 2013
Laste modifita: SMG 11an de julio, 2013
PDF de Nuance PDF Create 7.